

disdonita en Plovdiv 2002. Bedaŭrinde oni ne enigis niajn korektojn de majo 1999 (vidu TeKu 117, paĝo 2 malsupre). La rezulto estas diferencoj inter la nova libra varianto kaj CD-ROM-varianto de RailLexic 3.0. Tiuj diferencoj koncernas 181 terminkorektojn, 8 diferencojn nur je inversa vorta vicordo laŭ alfabeto listigo, kaj 11 terminojn mankajn en la libroj. La sekretario de Terminara Sekcio kompilis tiujn diferencojn, kaj povas sendi la liston al ĉiu interesato.



### Aperis Esperanto-bulgarā vortaro kun fervojfakaj terminoj

La bulgara landa asocio disdonis en Sopron libron kun Esperanto-bulgara terminaro. Tio estas bonvena, ĉar la bulgara lingvo ĝis nun ne apartenas al la 19 RailLexic-lingvoj. Mendoj eblas ĉe Rena Georgieva, ulica Jean Jaures 5, BG-4000 Plovdiv. Bazo de tiu vortaro estas FERVOJA TERMINARO EN ESPERANTO (FT-E) de 1989 (ŝlosilnumeroj 00001 – 10204). Bedaŭrinde ankaŭ tie niaj korektoj de aŭgusto 1999 ne estis enigataj. La korektolisto troviĝas en TeKu 108, paĝoj 3 – 8. Ĝi ampleksas 162 terminkorektojn kaj 121 forigendajn nedeziratajn sinonimojn. Cetere strangan kaj malĝustan, ke la aŭtoroj titolis sian vortaron TEKNIKA VORTARO anstataŭ FERVOJA VORTARO.

Ambaŭ landaj asocioj meritas nian sinceran dankon pro siaj grandaj sukcesaj klopodoj. Tamen jen peto: Se iu planas eldoni fervojan vortaron, bonvolu konsulti Terminaran Sekcion, por ekscii la aktualan staton.

### Peto al la rumana landa asocio

La provizora programo de 57-a IFEF-kongreso enhavas nur 1 trihoran kunsidon de Faka Komisiono. La rumana responsuloj estas petataj esplori eblon de aldona, dimanĉa kunsido, aŭ 14:00 – 16:00 h, aŭ samtempe dum urbogvidado 09:30 – 12:30 h.



## Terminara Kuriero

TeKu 122

Julio 2003<sup>4</sup>

### Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefona: +45 49 26 13 19 Retadreso: [esperanto@mail.dk](mailto:esperanto@mail.dk)

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefona: +49 351 8385877 Retadreso: [IFEF.B90GR-mei@t-online.de](mailto:IFEF.B90GR-mei@t-online.de)

### Karaj geamikoj,

mi esperas, ke ĉiuj kongres-partoprenintoj bone atingis sian hejmon, kaj estas kontentaj pri la travivaĵoj.

En Sopron okazis du kunsidoj de Faka Komisiono, unu 2,5-horan kaj unu 3-horan. Ĉeestis 12 sekcianoj kaj 17 gastoj. La diskutoj estis viglaj kaj profundaj tiel, ke ne eblis trakti ĉiujn nociojn laŭ TeKu 121. Tiukoncerne jen grava rimarkigo:

**La kunsida tempo en IFEF-kongresoj certe ĝenerale ne sufiĉas por necesdetale tiri terminajn konkludojn el la aktuala kvanto da tradukitaj difinoj. Sekve urĝe necesas uzi la tempon inter kongresoj por vigligi korespondan laboron.**

Retpoŝto povas tre faciligi kaj rapidigi la korespondadon kiel diskutado. Jen ret-adresoj konataj al mi, por ke vi povu sendi viajn proponojn, argumentojn, demandojn, notojn ktp samtempe al ĉiuj kunlaborantoj kun retkonekto:

### terminaraj sekcianoj

BERGH Rolf (NO)  
 FEIFIČOVÁ Magdaléna (SK)  
 HARTIG Heinz Dieter (DE)  
 HENRY Bruno (FR)  
 HOFFMANN Heinz (DE)  
 KOVÁŘ Ladislav (CZ)  
 KROGSTIE Per Johan (NO)  
 MIRKOVIČ Jovan (SI)  
 MORÓ Alfonz (HU)  
 NIEMANN Jan Uldal (DK)  
 NOBUKI Naosuke (JP)  
 OLSEN E Henning (DK)  
 SREDIČ Gvozden (YU)  
 TORNILLO Vito (IT)  
 VILLERMÉ Jean-Paul (FR)  
 YAMAMOTO Akiya (JP)

[rolf.bergh@c2i.net](mailto:rolf.bergh@c2i.net)  
[esperanto.feifi@vud.sk](mailto:esperanto.feifi@vud.sk)  
[Hartig.hd@t-online.de](mailto:Hartig.hd@t-online.de)  
[bruno\\_henry@laposte.net](mailto:bruno_henry@laposte.net)  
[IFEF.B90GR-mei@t-online.de](mailto:IFEF.B90GR-mei@t-online.de)  
[ladislav.kovar@worldonline.cz](mailto:ladislav.kovar@worldonline.cz)  
[pkrogstie@c2i.net](mailto:pkrogstie@c2i.net)  
[j.mirkovic@siol.net](mailto:j.mirkovic@siol.net)  
[moroa@freemail.hu](mailto:moroa@freemail.hu)  
[esperanto@mail.dk](mailto:esperanto@mail.dk)  
[naosuke.nobuki@mb8.seikyoku.ne.jp](mailto:naosuke.nobuki@mb8.seikyoku.ne.jp)  
[eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk)  
[intersam@eunet.yu](mailto:intersam@eunet.yu)  
[vitori@virgilio.it](mailto:vitori@virgilio.it)  
[JeanPaulVillerme@aol.com](mailto:JeanPaulVillerme@aol.com)  
[yamamoto-shibano@m2.dion.ne.jp](mailto:yamamoto-shibano@m2.dion.ne.jp)

**TeKu-kontaktpersonoj en landoj sen terminara sekciano**

BRLETIČ Marica (HR) marica.brletic@hznet.hr  
 EGGENBERGER Gertrud (CH) eggenberger.gertrud@bluewin.ch  
 HAN Zuwu (CN) hanzuwu@hotmail.com  
 Li Sen (CN) gao@public.hh.nm.cn

Kaze de adreseraro, bonvolu sendi al mi korekton. Same mi petas pri informo, se vi – terminara kunlaboranto – havas retkonekton, sed via nomo ne troviĝas en la antaŭpaĝa listo. Certe tre avantaĝus, se ankaŭ aliaj sekcianoj komputilposedantoj por si aranĝus retkonekton. Memkompreneble daŭrige eblas korespondi ankaŭ per normalaj leteroj.



Heinz Hoffmann

**Laborrezultoj en Sopron**

TeKu 121 enhavas sur paĝoj 2 – 7 traktendajn taskojn por la kongreskunsidoj. Kiel jam menciite, ne eblis trakti la tutan kvanton. Pri la sekvaj nocioj la partoprenintoj decidis jenajn terminojn:

**00024 vagonmovilo loke fiksita****00239 regejestro**


Notoj:

- a) La difino estis modifata al: Fervojoisto reganta aparatojn necesajn por signalado, konforme al preskriboj de fervoja ekspluatado.  
 b) Oni preferis "regejestro", se la klarigo de "estro" en PIV ne inkludas havi subulo(j)n, do ne inkludas esti ĉefo. Alikaze la termino estu "regejisto".  
 Jen la klarigo en PIV:

**estro** Tiu, kiu estas ĉe la supera kaj unua rango kaj posedas efektivan ordonpovon. RIM. La diferenco inter **estr** kaj **ĉef** estas tia, ke la unua insistas pri la ideo de efektiva ordonpovo, dum la dua elmontras precipe la altrangecon inter pluraj similaj.

Konkludo:

Ĉar signalado estas speco de ordono, la termino "regejestro" respondas al la decido.

**00431 translimiĝtaŭga****00625 petavizo pro neebila livero****01397 stacioparto aldonserva**

bildo 4 transporto sur vagono laŭ nocio c

09560 Veturilo taŭga por envicigi ĝin en trajnon, aŭ por memstare veturi kiel trajno.

an standard vehicle  
 fr véhicule courant; véhicule de type courant  
 ge Regelfahrzeug  
 E-o veturilo normaltipa

Problemo: Ne temas pri tipo (laŭ PIV, tipo 5 = modelo, aparte klasifikita, laŭ kiu estas fabrikata serio da similaĵoj).


Unua ŝanĝpropono: **veturilo trajnotaŭga**

Karaj gekolegoj, estas planite, en decembro 2004 fini la korespondadon pri tiuj terminoj, kaj en TeKu 123 indiki novajn traktendajn nociojn. Do bonvolu komenci baldaŭ sendi viajn unuajn opiniojn, kontraŭproponojn, demandojn aŭ aliajn notojn. Precipe per retroŝto ja ne necesas unufoje trakti la tuton, sed avantaĝas "diskuti" pri unuopaj proponoj.

**Aperis nova eldono de FERVOJA TERMINARO**

La hungara landa asocio vendis en Sopron unuajn ekzemplerojn de nova eldono (Budapest, 2004) de la presita FERVOJA TERMINARO en bonkvalita bindita formo. Mendoj eblas ĉe nia vicprezidanto István Gulyás, Rákos utca 98./9, HU-1155 Budapest. Li povas informi pri prezo kaj aliaj detaloj.

Kompare kun la unua eldono de 1997 (ŝlosilnumeroj 00001 – 12356), la enhavo pliboniĝis, ĉar oni aldonis ĉiujn RailLexic-ŝlosilnumerojn, por ebligi klaran komparon inter pluraj lingvoj, kaj ĉar laŭ nia korektofolio de aŭgusto 1998 estis korektataj 418 terminoj (kaj forigataj 12 terminoj). La kvanto da terminoj pligrandiĝis, ĉar oni aldonis 292 nociojn (ŝlosilnumeroj 12357 – 12689) surbaze de la suplemento




bildo 2 transporto sur rulekpaĵo laŭ nocio b

c. (difino ne en RailLexic)

Etŝpura submeta vagono por porti duaksan normalŝpuran vagonon, aŭ porti 1 boĝion de kvaraksa normalŝpura vagono. (vidu bildojn 3 kaj 4)

ge Rollwagen



bildo 3 vagono laŭ nocio c

Problemo: En la lingvoj angla, franca kaj Esperanto estas listigitaj nur po 1 termino:

an wagon carrier truck  
fr truck porteur  
E-o rulekpaĵo vagonporta

La termino **rulekpaĵo vagonporta** taŭgas pleje por nocio b.

Unuaj terminproponoj

por nocio a: **veturilo etŝpura vagonporta**

por nocio c: **vagono etŝpura vagonporta**

#### 02474 transportpostulado realigebla

Notoj:

- La difino estis modifata al: Nombro de transportoj realigeblaj sub kondiĉoj determinitaj laŭ klientaraj postuloj.
- La vorto "postulado" tiuloke respondas al la Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro.

#### 02814 trajnsekurigsistemo entraka

Noto:

En la difino la lasta vorto "ne-reago" estis ŝanĝata al "ne-respekto".

#### 03158 fervojinstalaĵo klienta

Noto:

La difino estis modifata al: Fervojinstalaĵo sur areo de fervojklienta entrepreno, havanta trakokoneksojn kun publika fervojreto, tiel ebliganta uzon de fervojaj veturiloj sur la klienta areo.

#### 03840 forto supera

Notoj:

- En la difino la vorto „sendeviganta" estis ŝanĝata al "ne deviganta".
- La terminon rekomendis la leksikologo prof. Erich-Dieter Krause.

#### 05067 fervojreto ĝenerala

#### 05346 programkomisiito

Notoj:

- En la difino la vortoj „kiu ricevas labormision" estis ŝanĝataj al "komisiita".
- La termino respondas la sole origina franca vortigo *conformément au programme du maître d'ouvrage*.

#### 06158 vojuza rajto pagenda

#### 07090 relo tavolumita

Aldone al la taskoj en TeKu 121 estis traktata la komplika problemo de nocioj 00901 kaj 00905:

00901 difino: Bloksistemo en kiu ĝenerale elektre interriglataj signaliloj kaj blokaparatoj estas permane funkciigataj.

ĝisnunaj terminoj:	an	interlocked block; interlocking block
	fr	block enclenché
	ge	Blocksystem mit Signalverschluss; Zugrückmeldung mit Blockverschluss; Abhängigkeitsblock
	E-o	bloksistemo signalilrigla

00905 difino: Sistemo ĉe kiu la sekurigo de trajnsinsekvo en kantono okazas permane kun helpo de komunikrimedoj inter ambaŭ kantonlimigaj blokstacioj.

ĝisnunaj terminoj:     an     manual block  
                               fr     block manuel; cantonnement manuel  
                               ge     Handblock ; handbedienter Block  
                               E-o    bloksistemo permana

Problemoj:

- a) Ĉiu bloksistemo estas teknika por rigli signalilojn. Sekve ĝusta termino por 00901 (ne por 00905), estas **bloksistemo permana**.
- b) La difino 00905 mencias komuniĝon, sed ne blokaparaton. Ne estas klare, kio okazas permane (nur telefonado kaj regado de signaliloj?). La decidita termino por 00905 estas **kantonigo per interkomuniĝo**.

Postulo al UIC estas forigi la ĥaŭson en la naciligvaj terminoj 00239, 00901, 00905 kaj 05067 per ĝusta elekto.

### Aktualaj taskoj por niaj kunlaborantoj

**Unue** bonvolu preni Terminaran Kurieron 121, kaj pripensi la proponojn por jenaj nocioj: 00873 (paĝo 3), 02822 (paĝo 4), 07861 (paĝo 5), 08135, 08442, 08973, 10254 (paĝo 6), 11190, 12324, 12416 kaj 12429 (paĝo 7).

La nocio 00873 jam estis traktata en Sopron, sed sen decido. Estiĝis la demando, kio apartenas al emisio, ĉar la difino tekstas "... rilatantaj al emisio kaj disdonado ...". PIV klarigas, ke emisii 1 estas krei kaj cirkuligi. Koncerne biletojn eblas konkludi, ke ties emisio estas kreo (preso, printo) kaj cirkuligo al biletvendejoj, kaj ke ties disdonado estas vendado al pasaĝeroj. Ĉe tiu kompreno ĝis nun aperis du terminproponoj:

- 1) **biletkoncerna sfero** (laŭ PIV, sfero 4 = la tuta tereno, sur kiu efikas ies agado)
- 2) **biletkoncerna fako** (laŭ PIV, fako 2 = aparta branĉo de scienco, arto, industrio, komerco ks)

Por la nocio 02822, en Sopron la difinteksto estis vortige modifata al: Signalilo de SNCF, kiu en **averta** pozicio ordonas al la trakciilestro tuj komenci singardan, laŭvidan veturadon, kaj halti antaŭ la unua renkontata ĉefsignalilo, trakforke aŭ trakokruaĵo.

Zdeněk Polák perletere proponis duajn terminproponojn por la nocioj

- 08135: **avertsono trakciila**
- 08442: **envagona porkarga areo**.

**Due** jen kelkaj aldonaj nocioj por serĉi plej taŭgajn terminojn:

06654 Centra regejo por tuto de itiner-aranĝado, trajn-regulado kaj funkciigado de elektro-substacioj sur fervojlinio por granda rapido.

an     train-regulating signal box  
 fr     poste d'aiguillage et de régulation  
 ge     Betriebssteuerzentrale  
 E-o    ĉef(trak)regejo trajntrafika

Problemoj: Necesas distingi la nocion de "trakregejo centra porlinia" (06681), ĉar la traktata regejo aldone regas trajntrafikon kaj elektro-substaciojn, do havas kompleksajn taskojn (laŭ PIV, kompleksa 1 = enhavanta en si plurajn malsamajn elementojn).

Koncerne "trakregejo" aŭ nur "regejo", en Sopron oni pledis por "regejo" laŭ la nova PIV.

Unua ŝanĝpropono: **regejo centra kompleksa**

08719 Tempo inter la momento kiam trajno ekfunkciigas anonaparaton de traknivela pasejo, kaj la momento kiam la trajno atingas la traknivelan pasejon.

an     annunciation time (level crossing); warning period; cycle duration; approach warning time; train approach warning duration  
 fr     temps d'annonce (passage à niveau)  
 ge     Einschaltzeit; Vorwarnzeit (Bahnübergang); Annäherungszeit  
 E-o    avertotempo amtaŭferma (traknivela pasejo)

Problemo: Ne temas pri tempo antaŭ ekfermo de pasejo.

Unua ŝanĝpropono: **fermtempo alvetura (traknivela pasejo)**

09450 Sub tiu ŝlosilnumero troviĝas laŭ germana versio – kontraŭregule – tri nocioj: unu genra nocio (a) kaj - orditaj sub ĝi - du speciaj nocioj (b, c).


- a. Fervoja veturilo sur etŝpuraj linioj, por porti normalŝpurajn vagonojn, kaj tiel ebligi ĝiscelan transporton de varoj sur tiaj vagonoj al stacioj en etŝpuraj fervojretoj kaj inverse.

ge     Rollfahrzeug

- b. Rulekipaĵo por porti duaksajn normalŝpurajn vagonojn sur etŝpuraj fervojlinioj. Noto: 1 etŝpura rulekipaĵo povas porti nur 1 radakson.

(vidu bildojn 1 kaj 2)

ge     Rollbock



bildo 1 rulekipaĵo laŭ nocio b